



Kulturaj Kajeroj

É. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Jarabono : 50 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

NOVEMBRO-DECEMBRO

1980 - 6

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

KULTURAJ KAJEROJ

1980

NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Pri tipa Anjua glob-ludo

B. Cheverry

Psikologiaj konsekvencoj de la imitema rivaleco

F. Boyet

La Diolkos

S. Guillot

Elena Lucrezia Cornaro

Neniam estas utile tro rapidi

F. Mora
trad. I. Nagy

Napoleono en urbo Győr

I. Nagy

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn orelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn
tagojn dum la venonta jaro.

El Grésillon

ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon F-49150 Baugé

Poŝtkonto : Nantes 1485 39 P

Telefono :

dum la aranĝoj (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj (40) 76 77 95

KULTURAJ ARANĜOJ

1981

PRINTEMPO:

alveno Dimanĉon 29an de Marto posttagmeze, — foriro Dimanĉon 5an de Aprilo matene
— Internacia Renkonto de infanoj.
— Praktika pedagogio.

SOMERO:

UNUA PERIODO

alveno Ĵaŭdon 2an de Julio — foriro Merkredon 22an de Julio
— PRELEGOJ diverstemaj.
— diskutoj pri la preletoj.
— Studado de la lingvo.
— Malkovro de la regiono.

DUA PERIODO

alveno ĵaŭdon 23an de Julio — foriro Merkredon 12an de Aŭgusto
— REKTMETODAJ KURSOJ por komencantoj kaj progresantoj.
— Studado de la lingvo (tradukado, studado de verkaĵo, gramatiko...)
— Manlaboroj.
— Malkovro de la regiono.

TRIA PERIODO

alveno ĵaŭdon 13an de Aŭgusto — foriro Merkredon 2an de Septembro
— STUDADO KAJ PRAKTIKO DE LA LINGVO.
— Seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto.
— Manlaboroj kaj artilaboroj.
— Malkovro de la regiono.

Detalaj programoj pri ĉiu periodo baldaŭ aperos.
Tuj informiĝu.

Esperanto tra la Mondo



Esperanto egalrajta en hungaraj lernejoj :

La instruado de Esperanto estas nun permesata en hungaraj gimnazioj kaj elementaj lernejoj, de la tria ĝis la oka klaso. Esperanto estas tie egalrajta al iu ajn fremda lingvo, elektebla, deviga studobjekto.

Esperantisto en kosmo :

Bertalan Farkas, hungara kosmonaŭto, kiu estis lanĉita en spaco dum Majo kun la sovetano Koubassov, lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj.

Grupo de amikoj de Esperanto en Itala Parlamento :

En Italio, la interparlamentara grupo « Amikoj de Esperanto » havas nun 90 parlamentanojn de sep partioj. Tiu grupo, kiel en Francio, prezentos novan leĝproponon por enkonduko de la internacia lingvo en la italaj lernejoj.

En Sovet-Unio :

— Dum la somero, centoj da gejunuloj partoprenis la esperantistajn tendarojn organizitajn en orienta kaj okcidenta partoj de Sovet-Unio (jam la duan fojon). Tiun jaron, tendaroj okazis en Krasnojarsk kaj Ivanovo.

— La Centra Konsilio de la Sovetaj Profesiaj Unuiĝoj konsentis helpi la organizaĵojn de sovetaj esperantistoj. La decido antaŭvidas helpojn al la lokaj grupoj koncerne ejojn por lernado, trovon de spertaj instruistoj, seminariojn, ktp...

Telefona kurso en Ĉikago :

En Ĉikago, oni povas lerni la internacian lingvon per telefona kurso. Ĉiu leciono daŭras 15 minutojn kun legaĵoj, demandoj kaj respondoj pri gramatiko. La kurso funkcias 24 horojn seninterrompe. Ĝi estas aranĝita de aŭdvida laboratorio de Universitato de Ilinoio.

Esperanto, pontlingvo en folkloro renkonto :

La etnografia muzeo en Torun (Pollando), kiu jam de kelkaj jaroj uzas Esperanton, organizis ĉijare internacian renkontiĝon de popolaj orkestroj. Partoprenis du orkestroj el Hungario, unu el Jugoslavio, unu el Slovakio, kvar el Pollando.

Ĉiu eksterlanda grupo venis kun esperantista tradukanto. Tiel, la lingvo efikis kiel pontlingvo. La aranĝo daŭros dum estontaj jaroj.

Adreso : Etnografia Muzeo en Torun, Waly gen. Sikoskiego 19, PL-87-100 Torun, Pollando.

Interesa deklaro de la Islanda prezidento :

La nova prezidento de Islando, S-ino Vifdis Finnbo-gadottir, opinias ke la superrego de la angla lingvo en internacia komunikado evidente endanĝerigas la kulturojn de alilingvaj popoloj.

Ŝi aldonis, interalie, « Neŭtrala lingvo, kiel Esperanto, estus ja ideala solvo de la interlingva problemoj, tio garantias pli da egaleco kaj malpligrigas la danĝerojn de lingvo-teknika monopolado de la angla. Mi sincere deziras

pli rapidan progreson de Esperanto, serve al ĉiuj nacioj de la mondo ».

En Unuiĝintaj Nacioj :

La Unuiĝintaj Nacioj, laŭ kontrakto kun Universala Esperanto Asocio, eldonis en esperanto-traduko, la ĉarton de U.N. kaj statuton de la Internacia Kortumo.

Kiam la japanoj kongresas...

— 500 japanoj kaj eksterlandanoj el 8 landoj partoprenis la nacian esperanto-kongreson, en Jokohama, fine de Aŭgusto. Okazis literatura konkurso kaj 21 fakaj kunvenoj.

— Antaŭ la kongreso, 150 gejunuloj partoprenis en Makino, 16 esperanto-kursojn dum tri tagoj.

Faka asocio pri sociaj sciencoj :

Fondiĝis internacia asocio de esperantistoj kiuj okupiĝas pri la sociaj sciencoj (psikologio, sociologio, antropologio, ktp...).

Informas D-ro F. Pignatelli, V. Volotti 5, int. 10, I-35100 Padova, Italio.

Aŭtobuse tra Eŭropo :

Esperanto-Centro (Banegårdsgade 19, DK-8000 Arhus C, Danlando) organizis dum Julio unumonatan vojaĝon tra 14 eŭropaj landoj.

Eblos partopreni la tutan aranĝon aŭ nur parton de ĝi (vojaĝo tra Danlando, Germanio, Nederlando, Belgio, Luksemburgo, Francio, Svisio, Italio, Aŭstrio, Jugoslavio, Hungario, Ĉekoslovakio, Pollando).

La esperanto-kabaredo en Parizo :

La kabaredo « La ruza kruĉo » prezentas sian spektaklon en Parizo ĉiun trian mardon de la monatoj, je la 21a horo, en la trinkejo-restoracio « L'Emeraude », 35 bulvarde Bourdon, 75004 Parizo, metrostacio « Bastille ». En 1981 : 21-1, 17-2, 17-3, 14-4, 19-5, 16-6.

Virina aktiveco :

— Aperas trimonata bulteno pri la virina evoluo kaj movado, en internacia lingvo. La nomo : « Sekso kaj egaleco ». Adreso : Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnengweg 197B, 3021G Rotterdam, Nederlando.

— Okazos la semajnfino « Eva » (28a de Februaro — 1a de Marto 1981) en Rotterdam, por la virinoj kiuj deziras pli aktive okupiĝi pri esperantista virina agado.

— Estis eldonita kasedo de « inismaj » kanzonoj en Esperanto, kantita de Suzana Liverita kun faldlibreto enhavanta ĉiujn tekstojn kun komentoj kaj « preterkonduko » de Anna Brennan.

Stokholmo, okazis seminario pri la kontraŭvirina diskriminacio.

En Hispanio :

La hispana sekcio de Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj kalkulas 360 membrojn, 50 provincajn kaj 36 urbajn delegitojn. Krome, 959 personoj aliĝis al la perkoresponda esperanto-kurso.

Scienco kaj Esperanto :

— En Aprilo, 200 estintaj studentoj de la Varsovia Teknika Universitato (kemia fakultato) diskutis pri la temo « Esperanto en la scienco kaj tekniko ».

— Scienca rondo de esperantistaj studentoj organizis aŭtunan forumon en Debrecen (Hungario).

Kiam Esperanto estas atakita...

En Francio, la enciklopedio « Quid », en la eldono 1981, aperigis en la rubriko « Esperanto », senbazajn kaj nekonatajn kritikojn. Jam, francaj esperantistoj energie reagis kaj espereble, ankoraŭ aliaj kompetentaj legantoj skribos al la redakcio... en taŭga formo.

Novaj libroj :

— « Rikardo Tria » de Shakespeare, Tradukis John Francis.

— « Esperanto, la internacia Lingvo. Sciencaj aspektoj », 235 paĝoj. Eldonita en G.D.R. Redaktis Detlev Blanke, konata esperantista lingvisto. 25 studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio de diverslandaj aŭtoroj.


— « Enciklopedio de Esperanto ». Represo en unu volumo, de la unua eldono de 1933.

— « Studoj pri la esperanta literaturo », 143 paĝoj. Serioza verko de Benzik.

Pri tipa Anjua glob-ludo

Multaj geesperantistoj kiuj jam venis en Gresillon trovis, en apuda vilaĝo kaj en tiea specifa etoso, la okazon konatiĝi kun tiu sport-ludo, malnova, sed ĉiam vivanta ĉar vekanta konstantan intereson ne nur de lokaj sportuloj kaj amatoroj, ankaŭ de turistoj.

Laŭdire, tiu sporto de la Anjuanoj bone respegulas la karakteron plej ĝenerale kvieti kaj ekvilibra, facile adaptebla al subtila ludado kiu pli postulas lertecon ol forton, kvankam, franglingve, oni nomu ĝin « boule de fort » (bul' de fort'). Kial ? Jen : La globo aŭ bulo, el dura ligno, buksa, sorpo, gajako, eventuale frakseno aŭ kverko, por rezisti al oftaj, fortegaj ŝokoj, plie, estas ĉirkaŭata de metalo. En kovritaj restas la du kontraŭaj platigitaj punktoj el kiuj unu estas iom elkavigita ĉe la centro kiam la alia, iom balatista per plumbo, estas pli peza, do pli « forta ».



La ludejo, ni diru la glob-glitejo, el fajne kriblita tero zorge kaj konstante eben-batita, proksimume dudek kvin metrojn longa, ses metrojn larĝa, prezentas flankajn, superlevitajn randojn kiam la ekstremajo, konsistante el strabegoj, celas al reteno de la globoj.

Ĝis la komenco de nia jarcento, tiaj sportejoj estis subĉielaj, sed, de post, konstante progresadis la elektra lumigado kiu donas en plej nigraj ĉambroj la iluzion de sun-taga lumo permesante al la ludantoj sporti laŭdezire ia ajn estu la horo, ia ajn estu la ekstera vetero.

Sub kontrolado de mezurantaj arbitraciantoj, ludbatalo povas oponi unu kontraŭ unu, du kontraŭ du, eĉ

tri kontraŭ tri ludantojn. Ambaŭ disponas du globojn. Sinsekve, ili provas alproksimigi sian bulon al la « mastro », kiu estas ĉefa, celinda kaj « dormanta » globo. Iroj kaj revenoj, de klinanta bordo al alia, de tiaj ne ordinaraĵoj, kies formo igas ilin malobeemaj, donas al lertaj ludantoj la okazon imagi plej multnombrajn kombinaĵojn por ĝuste trafi la celon, trovi aliron inter la « dormantaj » globoj, teren kuŝantaj ĉirkaŭ la « mastro ».

Tiu ludo, nek aŭtomata, nek banala, postulas prienson kaj lertecon. Plue, kaj prave, oni nomas ĝin « Societa » ludo, eĉ tute simple « Societo » ĉar organizata kaj praktikata de sportularo kiu mem prizorgas ĉion necesan koncerne la ejon kaj la ilojn. Ĝis nun esence vira, tiu sporto enkondukis la dirajon « iri al la Societo », kiu por Anjuanoj signifas longdaŭra restado de la edzoj ekstere de la hejmo... kaj reveno kun ebla ebrieceto ! Ja, trinkadoj kun intertingigadoj de la glasoj inter la ludantoj de « boule de fort » estas kzavaŭ rito !... kaj la Anju vino estas bongusta, kiel ĉiuj scias. Kial ne profiti la okazon malpleniĝi botelon en amika kuneco ? Unu sola botelo, kompreneble !

Al vi, karaj gelegantoj, mi deziras baldaŭajn, agrablajn libertempojn en Anju.

B. CHEVERRY, el ANGERS.

GRAVA ATENTIGO

Pro altiĝo de la preskostoj kaj poŝtarifoj ni estas devigataj altiĝi la abonprezon de via revuo kiu

por 1981 estos 50 frankoj

(ni dankas la amikojn kiuj regule sendas pli ol la baza prezo)

PSIKOLOGIAJ KONSEKVENCOJ DE LA IMITEMA RIVALECO

ENKONDUKO

Mi jam prezentis la tezon, laŭ kiu la evoluo ekde la antropoidoj al la homo okazis per pliampleksigo de la imitemo, kiu superis la protektantan instinkton de la mamulaj socioj. Pro tiu malapero de la instinkto, la homoj, por pluvivi, bezonis eltrovi homan solvon, kiu estis la kolektiva murdo, el kiu naskiĝis la sistemo de ritoj, tabuoj kaj mitoj, kiu karakterizas la malmmodernajn homajn sociojn, kaj poste evoluis al la nuna stato de la modernaj sociaj institucioj.

Mi tiam montris la iamajn sociajn konsekvencojn de tiu prakulturo, sed oni ankaŭ povas studi la nunajn konsekvencojn de tiu prahoma konduto en psikologio.

IMITEMA DEZIRO NEPRE KONDUKAS AL SENOBJEKTA RIVALECO

Komence, iu homo deziras ion, kaj tio estas natura bezono. Sed, pro imitemo, alia homo deziras precize la saman: objekton, konduton, socian situacion k.t.p. Tiam la homo suferas la rivalacon ne ĝin perceptante klare, ĉar la imitemo estas senkonscia same kiel la reala fonto de tiu rivalaco. Por klarigi tiun misteran rivalacon, la homo eltrovis la mitojn, kaj por kuraci tiun malsanon, ĝi praktikis, kiel mi jam diris antaŭe, unue originan murdon, kaj poste kaj la tabuojn kaj la ritojn.

Sed pro tiu rivalaca deflankiĝo, la deziro nepre kondukas al malsukceso. Kiam la homo sukcesas akiri la celitan objekton, se pro la psika evoluo estas granda diferenco inter la reala objekto kaj la objekto pibeligita pro la rivalado, tiam la homo suferas pri la diferenco inter revo kaj realo, kulpigas kaj la objekton kaj la rivalon, kiu fariĝis por ĝi modelo. Kiam oni atingas sufiĉan diferencon inter realo kaj idealigita celo, tiam, kiu ajn estas la materia situacio, la homo psike malsukcesas.

El la rivalado naskiĝas paroj, kiujn estras senkonscia reciproka perforto. Unu trudis sian forton al la alia, kiu, siavice uzure reciprokas. Pro la influo de perforto, la modelo fariĝas kontraŭmodelo, ne plu temas pri imitemo sed nepre rivalaca serĉo de diferenco. Dum la evoluo de la paro, la celo de la rivalado ŝanĝiĝas: unue estis reala objekto kies psika valoro kreskas dum akriĝas rivalaco, sed poste la valoro transiras al la rivalo; por la spektantoj la rivalado estas senkiala, kiam oni demandas la rivalojn, ili respondas per « prestiĝo », « honoro »... tiu estas situo rilate al la alia. Tiam oni povas racie diri, ke la homoj batalas por nenio, dum pasie kaj subjektive, ĉiu estas preta oferi ĉion por venki.

Fakte la mekanismo de la imitema rivalaco baziĝas sur la fascino, kiun la rivalo trudas al la deziranto. La deziro, kiu unue rilatis al reala objekto, fariĝas deziro imiti la rivalon, tio estas pli kaj pli rivali kun tiu homo, kiu, vole ne vole opozicias kaj estas mem la obstaklo, kiu, poste, estos nomata « leĝo », fare de la socio, aŭ « supermio » fare de la psikanalizistoj. Oni povas pravigi tiun tezon rimarkigante, ke nur malpermeso, kiu fontas en opozicio de rivalo povas naski humiligon. Se « leĝo » malpermesas, oni obeas aŭ ne, sed oni ne sentas ofendon, sed en la imitema rivalaco, ĉiu el la du opoziciuloj sentas sian personon humiligitan fare de la sukceso de la alia, kaj nepre deziras supervenki ĝin, por pruvi al si mem kaj al la aliaj, ke li ne estas malsupera.

Per tiu mekanismo, la deziro pli kaj pli ampleksiĝas ĝis plej gravaj psikaj konsekvencoj, kiujn mi pli poste detaligos, sed estas utile rimarki, antaŭe, kiel tiu mekanismo de la imitema deziro ludas gravan rolon en la homa naturo kaj la homa socio.

IMITEMA DEZIRO KAJ PERFEKTIGO DE LA HOMA PERSONEKO

Unue la imitema deziro apudas la naskiĝon de la homa konscio. Se, ĉiufoje kiam estas « natura deziro » aperas samtempe por la homo ankaŭ rivalo, la homo alkitimiĝas al la ekzisto de paroj, kiuj opozicias, kaj oni povas racie hipotezi, ke en tiu bildo de paro kaj opozicio troviĝas la bazo de konsciigo; fakte, ĉiuj psikologoj akordiĝas por konstati, ke konscio naskiĝas pro ekzisto de obstaklo, kiu ajn estas la naturo de tiu obstaklo. Laŭ ĉi tiu tezo, la unua fundamenta obstaklo estas la rivalo.

Due, la imitemo apudas ankaŭ la lulilon de lernado. La homo lernas per imito, kiu, trans la instinkto karakterizas la homan destinton, kaj permesis la socian evoluon de la kulturo. Sed kiam iu homo lernas de mastro, ĝi pli kaj pli sukcesas kaj iam fariĝas tiel lerta kiel estas la mastro, kaj tiam naskiĝas rivalaco. La mastro fariĝas jaluza, ĝi komencas malfidi sian disĉiplon, sed tute ne klarigas tiun rivalacon. Samtempe, la disĉiplo, kiu ankaŭ ne vidas la rivalacon, pli kaj pli deziras imiti la mastron kaj tiel kreskas la progreso.

La progresemuloj deziras liberigi la homon de la sociaj katenoj, kaj por tio, penas malaperigi la sociajn leĝojn, modernajn restaĵojn de la tabuoj. Sed fakte, tiujn sociajn limigojn anstataŭas la imitema rivalaco, la konkurenco multe kreskas, kaj portempe progresigas la socion, sed iam, la rivalaj opozicioj aperas kiel pli sklavigaj ol la sociaj bremsoj. Kompreneble, oni provas klarigi tiujn malfacilaĵojn per novaj mitoj pri rasoj, klasoj, aŭ patro, sed tiuj modernaj mitoj, same kiel la antikvaj, nepre kondukas al amasa murdo, kaj tio ne estas feliciĝa solvo.

En la moderna mondo, pro la malfortigo de la tabuoj, kaj en la modernaj socioj ankaŭ de la hierarkioj, la deziro ŝajnas natura kaj fleginda, ĉar ĝi estas ne nur rimedo de iluzia feliĉo, kiel ni ĝis vides, sed ankaŭ motoro de la progreso. Sed la socia senlimeco de la deziro kondukas al libera evoluo de la imitemo kaj pliampleksigo de tiu rivalado, kiu kondukas, ne nur al malsukceso, ne nur al malfeliĉo, sed ankaŭ al psikaj difektoj.

IMITEMA DEZIRO KAJ PSIKAJ MALSANOJ

La plej simpla kaj paca imitemo okazas en hipnoto. Tiam la hipnotigito neniam konfuzas sin kun la hipnotiganto, kiu estas la « alia », al kiu plaĉas obei per imito de la deziro. En tiu situacio, kiu cetere similas al la rilato inter superulo kaj malsuperulo en mamulaj socioj, ne naskiĝas rivalaco, la imitado ne kondukas al krizo.

La religiaj aŭ ritaj trancoj similas al la ordinara hipnoto. La fidelulo, kiu deziras akcepti en si mem spiriton, dion aŭ iu ajn favoran potencon, unue trejnas sin en imitemajn kondutojn. Ĝi ripetatas monotonan frazon, ĝi aŭdas ripetitajn ritmojn, ĝi korpe dancas laŭ ritaj ritmoj, ĝi uzas diversajn rimedojn por forigi sian personecon, kaj imiti la sintenon de la dezirata modelo. La diferenco kun la nura hipnoto kuŝas en la fakto, ke, provizore, la fidelulo kredas sin dio, ĝi partoprenas la vivon de la imitata estaĵo. Sed tiuj trancoj estas nur provizoraj, kaj post la tranco, la fidelulo retrovas sian personecon, kiu, eĉ se ĝi estas sentata kiel parto de pli granda estaĵo, tamen konservas sian proprecon.

En la demonhavadoj, la situacio estas inversa. Kiel bone studis Aksle (Huxley) pri la demonhavantinoj de Lundo (Loudon) en la 17-a jarcento, temas pri histerio, kie la malsanulo sentas sin tute individua, sed samtempe

invadita de fremda kaj malamika estaĵo, kiu suferigas la malsanulon. Tia situacio situas inter la ĵus aludita tranco kaj la psikozo pri kiu poste temos. En tiu kriza situacio la fino povas okazi nur per rito, jen pure simbola rito religia : la ekzorcisto forpelas la demonon, jen per murdo de la malamiko, kiu fakte okazis en Luduno, kie iu senkulpo Urbajno Grandie (Urban Grandier) estis mortkondamnita per religia tribunalo. Tiu religia decido, en la 17-a jarcento, tute memorigas al ni la ritajn murdojn de la praepoko, necesajn por pacigi la homojn. Ĉi tie temis pri virinoj, kiuj, pli malpli nekonscie deziris la viron, kiu pro sia rifuzo fariĝis la obstaklo, kiu kreskigas la deziron, kaj ankaŭ la rivelecon, kaj tiel plu...

Ankaŭ la rilatoj inter skizofrenio kaj komunikado estas interesa por nia studo. Laŭ Bateson, skizofrenio naskiĝas en infano, kiam ĝi ricevas de la sama persono, ĝenerale la patrino, mesaĝojn kontraŭdirajn. Tiam la infano, kiu ne povas plenumi la dezirojn, ĉar ili estas kontraŭdiraj, unue suferas, kaj poste provas eskapi tiun turmenton per plena fuĝo el la komunikado, ĝenerale lingva. Tia infano ne plu komprenas la parolon kaj ne plu parolas, ĝi fakte rompas la komunikadon, kiu fariĝis por ĝi ne toleribla. Estas interese kompari tion kun la teorioj pri la modernaj interkomunikiloj. La mesaĝo efikas al la celato, sed ankaŭ retroefikas al la celanto. Tiu influo retroira agas sur la venonta mesaĝo kaj la sistemo evoluas. Iam, la diferencoj kondukas al amortizo de la kontraŭdiroj, kaj ĉio ekvibriliĝas ; sed en alia kazo, kiam la diferencoj pligrandiĝas la kontraŭdirojn, tiam okazas krizo, kiu detruas la komunikadon. Kompreneble, tiuj ekzemploj estas interesaj por la fenomenoj en iu paro de rivaloj de la imitema deziro ; kiam la opozicio fariĝas netolerablaj okazas krizo, kies konkludo povas esti rompo de la komunikado, tio estas skizofrenio.

La lasta ŝtupo en tiu vojaĝo al infero de la psikaj malsanoj estas la psikozo, kiu aperas en la paro de la imitema deziro, kiel kunfandiĝo de la personecoj. Laŭ la tezo de la origina ofero, la homoj fariĝis homoj per individuigo, post la ofero. Antaŭe, la homoj rilatis nur per krioj, ne kapablis pensi, kaj batalis en mensa konfuzo. Por klarigi aĵojn de psikozo, sufiĉas pensi, ke, en la konflikto interna al la paro reaperis krizo tiel grava kiel estis la origina krizo. Oni scias, ke el tiu krizo, la homoj eliris nur per kolektiva murdo. Se en nia nuna socio la krizo estas maksimuma, kaj ĉar nun ne plu ekzistas la solvo de la murdo, la homo revenas al la antaŭa situacio antaŭ la homiĝo. La personeco detruigis, la malsanulo kredas sin aliulo (ĝenerale la rivaloj).

Teorie, se la imitema deziro antaŭeniras sen bremsoj, ĝi kondukas al la krizo, kiu fondis la homan kulturon, pere de la fundamenta ofero, kaj poste de la ritoj. Sed kiam estas nek oferoj, nek ritoj, la tuta libereco de la deziro kondukas nepre aŭ al individua murdo (inkluzive de la memmortigo), aŭ al psikozo, frenezo. Praktike, la homoj evitas frenezon pere de la restaĵoj de ritoj, kaj pere de la modernaj mitoj, kiuj kondukas al militoj.

La teorio de la imitema riveleco permesas klarigi la transiron de la besto al la homo, de la infano al la matura homo, la lernadon kaj la kulturon. Per la sama mekanismo, oni povas inverse klarigi la perforton, la maldordon, la konfuzon kaj la frenezon.

IMITEMA RIVALECO KAJ SEKSLOGIO

La imitema deziro naskas, tra la riveleco, iun obstaklon al la deziro. La deziranto ne komprenas la kialon, sed konstatas la fakton, kaj fine konkludas ke la valoraj objektoj estas la plej malfacile atingeblaj. La modelo fariĝas tute nature obstaklo, sed la deziranto, kiu serĉas valorajn dezirarojn, reciproke faras de la obstaklo la modelon. Ĉar la deziranto obstine serĉas la obstaklojn, kiuj nepre vundas ĝin, tial la observanto, kiu ne konas tiun mekanismon, kredas, ke la deziranto serĉas la doloron kaj nomas ĝin masohisto. Reale la deziranto taksas

la valoron de la dezirajo laŭ malfacilaĵoj, kaj ju pli ĝi suferas, des pli ĝi fieras atingi la plej grandajn valorojn.

Kiam la homoj ne nur vivas tiun « masohismon », sed krome reprezentas ĝin en siaj seksaj rilatoj, tiam la amoro estas nomata sado-masohisto. Fakte, en tiu situacio, la homo, kiu rolas en reprezentajo, provas trovi la ĝuon ne en la ĉefa seksa rilato, sed en la rilato kun la alia. Kaj tiu rilato estas tipe riveleco, tio signifas, ke la homo sentas sin, aŭ malsuperulo kiu estas des pli feliĉa, ke la alia estas pli tureriga, aŭ superulo, kaj tiam ĝi deziras elmontri tiun superecon. En la du kazoj, la ĉefa karaktero de la deziro estas la transiro de la objekto mem (seksaj rilatoj) al la kontraŭdolo, kaj kompreneble, tia rilato al rivalo estas nepre konflikta, konflikto kiu povas esti fizika aŭ morala laŭ la cirkonstancoj.

La sinteno de samseksemuloj klarigeblas per sama situacio. Ekzemple, iu ĵunulo estas fianĉo de ĵunulino ; li renkontas alian viron, kiu aperas al li kiel imitinda modelo, ĉar tiu viro kutime sukcesas kun la virinoj. Sed denove laŭ nia kutima transiro, la ĵunulo tiel admiras la viron, ke la deziro transiras de unu al la alia, kaj la modela viro fariĝas la amato de la ĵunulo.

Frojd (Freud) aludis al kaŝita (li diris latentaj) samseksemo, kaj pri tio citas Dostojevski (Dostoievski). Kaj fakte, en la verkaro de tiu aŭtoro, la virinoj estas ekzemploj estas tiu de la « eterna edzo ». La ĉefrolulo de la romano estas viro, kiu elektas la virinojn uzante la jenan kriterion : se la virino estas elektita de « fakulo », tiam la virino indas je amo. Per tiu metodo, la « edzo » elektas nur virinojn kiuj havis, havas aŭ havos kromedzon, ĝuste tiu, kiu konsilas. Kompreneble, la situacio en la romano estas pli komplika, sed la kerna reago de la eterna edzo estas tiel tre fidele resumebla. Ĝi estas tipa ekzemplo de la transiro de la deziro. La viro ne « deziras » esti kokrito, sed ĉar li sisteme elektas la amantinojn de sia « kriteria amiko », vole nevole, li serĉas la kokritecon kaj ricevas ĝin.

PSIKANALIZA MITOLOGIO

Dum siaj studoj, Frojd (Freud) multfoje renkontis la triopon : la objekto de la deziro, kaj la du konkurantoj, kiuj samtempe deziras ĝin. Depost Platono, la homoj, kaj speciale la scienculoj, kredas, ke ĉio havas modelon ie ajn en la mondo. Tial Frojd serĉis tiun modelon, kiu ekzistas, mite, en la Edipa rakonto, sed en la realaĵoj. li povis trovi nur unu tian tipon, tio estas la familia triopo.

Sed la triopo de Frojd ne bone klarigas la situacion, ĉar Frojd diras, ke la filo deziras imiti la patron, sed li ne diras, ke tiu imitemo eksplicite rilatas al la deziro pri la patrino. Kontraŭe, en sia teorio, Frojd diras, ke la infano deziras sian patrinon denaske, kaj por tio li ligas en la teorio de la « libido », la buŝan plezuron de la suĉinfano al la seksa deziro. En la teorio de Frojd la bildo de la patro estas unue rivala, kaj « lega » (obstakla), sed ne konkurenca por antaŭa sama deziro.

Krome, la teorio de Frojd ne kapablas respondi al la demando : « Kiel la malsanuloj kopiis la familian triopon ? » Kaj, ĉar la teorio ne sufiĉas, tial Frojd eltrovis alian kroman instinkton, kiu estas la « instinkto pri morto ». Cetere, eĉ kun tiu kromaĵo, la teorio ne povas klarigi, kial tiu fenomeno ripetigas. Ekzemple, kial iu viro serĉas rivalojn pli kaj pli prestiĝajn... dum la familia triopo estas ĉiam la sama. Kontraŭe, la imitema deziro, kiu kondukas al riveleco, tre simple klarigas tiun situacion de triopo, kaj tre ĝenerale, ne nur pri seksaj aferoj. La imitema deziro nutras sin de la malsukceso, por serĉi rivalojn pli kaj pli valorigajn.

Por distingi la situacion, kie la rivalo estas samtempe modelo kaj obstaklo, Frojd imagis la ekziston de du edipaj sistemoj : la normala kaj la enormala. Kaj por pravigi tiun novan nocion, li eltrovis iun latentan samseksemon de la malgranda infano al la patro. Tiu samseksemo de la filo al la patro estas senpruva hipo-

tezo, neniam renkontita, kaj tute ne necesa, kiam oni uzas la imiteman rivelecon.

Ĉar la jam trovitaj mitoj ne klarigis ĉiujn situaciojn, Frojd eltrovis poste la duseksismon, kaj la narcisismon. Frojd distingas du dezirojn : la objektan deziron, kiu estas ĉefe vira (li diras), kaj la narcisan deziron, kiu estas esence ina (li diras). Kaj Frojd priskribas konduton, kiun li konsideras kiel karakterizilon de la virinoj (li aldonas belaj). Fakte, kiam oni atente studas tiun « karakteron », oni konstatas, ke ne temas pri seksa karaktero, sed simple pri strategio de ĉiuj koketulinaj. La koketulino scias, ke la deziro altiras la deziron, tial ŝi ŝajnigas memdeziron por altiri la deziron de la viroj, kaj ju pli multaj estas la dezirantoj, despli dezirinda estas la virino (estas bona ekzemplo en « La Mizantropo » de Molière). Sed la objekta deziro rilatas al la narcisa deziro laŭ tute simpla regulo : la imitemo, kaj la imitema teorio senutiligas ĉiujn mitojn eltrovitajn de Frojd.

LA LIBERIGO EL LA INFERO DE LA IMITEMA DEZIRO

Estas facile rakonti, ekzemple en romano, kiel iu homo sukcesas liberiĝi de la imitema deziro. Kontraŭe, estas tre malfacile aĝi mem al sia persono. Por liberiĝi, necesas transiri ĉiujn mitojn, kiuj invitas kulpigi la aliajn pro niaj malfacilaĵoj. Kaj, ĉar nia homa kulturo baziĝas sur tiuj mitaj kredoj, la liberiĝo povas okazi nur se oni detruas en si ĉion, kion konstruis la homa kul-

turo : la « mio », la « persono »... Tia rompo ekzistas kutime jen per psikanalizo, jen per religia krizo.

En la kristanaj tekstoj, la « skandalo », kiun oni tradukas foje per skandalo, foje per falo, estas fakte la imitema deziro, aŭ pli ĝuste, la obstaklo de la rivalo. En la evangelio, ĝi estas la kontraŭo de la « amo » laŭ kristana koncepto. Por interpreti la frazojn (Mateo 18 : 5-9) kie Jesuo diras : « Se via mano aŭ via piedo estas por vi kaŭzo de falo, tranĉu ilin kaj forjetu ilin... » ...la Frojdistoj elvokas kastradon, kiu tute ne klarigas la tekston. Kontraŭe, se oni komprenas, ke la « falo » (skandalo) estas la imitema deziro, oni povas kompreni, ke por forigi tian gravan malamikon, estas bone perdi parton de sia korpo.

Kiu ajn estu la nomo kaj la simbolo, kiu montras la imiteman deziron, la azianoj parolas pri « vualo » kaj « ŝajneco », en ĉiuj teorioj religiaj, oni provas ŝirmi la homon kontraŭ la imitema deziro, kiu kondukis la prahomojn al teruraj buĉadoj, el kiuj ili eskapis nur per ritaj murdoj, kies moderna formo estas la milito. Oni povas diri, kun la religuloj kaj la antikvaj « saĝuloj », ke homo estas « libera », nur kiam ĝi komprenis tiun mekanismon, kiam ĝi liberiĝis el la ŝajneco de la deziro, aŭ el la origina peko per tute alia « nova » sintenado rilate al la mondo kaj al la aliaj homoj. Oni ankaŭ povas diri, ke la nuna tendenco de la moderna mondo, kie regas la senbremsa deziro, kaj la konkurenco, ne faciligas tiun konverton al paco kaj amo.

F. BOYET.


LA DIOLKOS

La historiistoj de la Antikvaj Tempoj, Herodoto kaj ŭicidido, pli poste la geografo Strabon kaj la raportisto Paŭzanio ĝin notis. Tra la mallarĝa istmo, kiu disigis Peloponezon de Atiko ekzistis sistemo, kiu, tra la teroj, transportis la ŝipojn de la Korinto-golfo al la Saroniko-golfo, kaj inverse. Pentraĵo sur vazo montras Dionizon starantan sur ŝipo kun radetoj. Tiun sistemon oni nomis Diolkos ; ĝi estis trenado-vojo ; tekstoj precizigas, ke ĝi ankoraŭ ekzistis en la unua jarcento (P.K.) ; poste, laŭlonge de la jarcentoj, ĝi malaperis. Eĉ oni ne retrovis ĝin dum la fosado de la nuna kanalo en 1883-1893. Nur

en 1958, okaze de elkavigo, je 2-3 kilometroj de Korinto, oni malkovris marmorajn blokojn, kiuj estis apartenintaj al antikva konstruaĵo ; en kelkaj monatoj oni elfosis la malnovan straton, laŭ longo 80 metra, ambaŭflanke de la istmo.

Kial la Diolkos ?

Por pasi de la Iona maro al la Egea maro necesis ĉirkaŭiri la duoninsulon. La kabo Malee havis — kaj



ankoraŭ havas — malbonan reputacion. Tie ĉi la vent-frapoj estas violentaj kaj velsipo ĉiam riskas esti for-puŝita al la maro. En la tempo de Periandro, se oni estis ĵus malkovrinta la ankron, oni ankoraŭ ne konis la ru-dron. Se malŝance oni maltrafis la pasejon de Citero, oni riskis retroviĝi, kelkajn tagojn pli poste, sur la bordo de Afriko. Tio okazis al Korobios, Kreta ŝipisto, kiu grundis sur la Libiajn bordojn. Uliso spertis la saman aventuron kaj atingis la Insulon de la Lotofagoj (la aktuala Djerba). Oni diris : « Se vi preterpasas la kabon Malee, forgesu vian patrujon » ! Oni preferis ne provi kaj pagi al Korinto la transŝarĝadon, de unu bordo al la alia.

Por faciligi kaj pligi la komercajn interŝanĝojn, Periandro konstruigis la diolkoson (de 627 al 585). La diolkoso igis la granda, internacia vojo de la grekaj kaj romiaj tempoj. La diolkoso estis vera slabita vojo ; 10 metrojn larĝa apud Korinto, ĝi mallarĝiĝis ĝis 6 kaj 3 metroj ; oni ankoraŭ vidas paralelajn faldojn distan-cajn je 1,5 metro, kiuj servis kiel reĵoj ; en la delikataj pasejoj, kiam la deklivo igis pli forta, kaj kiam la irejo desegnis kurbiĝon, la faldoj estis anstataŭigitaj per mal-grandaj muroj, kies internaj facoj estis beveltaj.

La ŝipo, malŝarĝita aŭ ne, estis subapogita per ligno-ruĵoj kaj puŝita sur la firman teron ; tiam oni ĝin ŝarĝis sur specialan platformon ; tiu platformo havis radojn ; oni tiris la platformon ĝis la alia bordo de la istmo ; ĉi tie oni relokis la ŝipon sur la maron kaj oni remetis la varojn en la ŝipon. Hodiaŭ oni malfacile imagas kia devis esti tiu giganta operacio de trenado kaj la enor-ma disvolvado de maŝinoj, de vinĉoj, de ĉevaloj, de viroj, kiujn ĝi bezonis. Kiom da neantaŭviditaj obstakloj devis subite montriĝi laŭlonge de la vojo, haltigante la iradon de la transporto por ne difinita tempo, blokante la tutan trafikon : unu kablo, kiu rompiĝas ; unu traba apogilo, kiu cedas ; la ligno, kiu varmigas por la stre-ĉiĝo kaj flamiĝas ; la vojaĝo estis finita ; kaj neniu ase-kuro kovris la damaĝojn. Tamen dum 1 000 jaroj, kaj eĉ plu, la eŭropaj komercistoj uzis la diolkoson. En diversaj lokoj de la konstruado oni trovis surskribojn, kiuj estas nek « grafitioj » nek markoj de metiistoj. Kelkaj arkeo-logoj sugestis, ke eble tenis pri ia signalaro, simila al tiu de niaj stratoj kaj fervojoj : eble por indiki al la kondukanto de la transporto la obstaklojn, kiujn li baldaŭ renkontos. Unue la diolkoso transportis ŝipojn kun mal-forta tonelaro ; pli poste la tonelaro estis pli forta. Eĉ tuta ŝiparo uzis la rulantajn platformojn. Oktavo-Aŭgus-to, postkurante la ŝiparon de Antonio kaj Kleopatru, kiu troviĝis en la Egea Maro, decidis malebligii ilian retre-ton al Egiptujo ; tial li uzis la diolkoson. Oni imagu tiun militan eskadron arigitan en la golfo de Korinto : unu post la alia oni ŝarĝis la ŝipojn sur la ĉarojn de la diolkoso. Oni imagu la miregon de la loĝantaro, la bruon, la kriojn, la venton, la polvon ; sed ankaŭ la precizegajn manovrojn. Kaj super ĉio la sunon de la mediteranea somero.

Al Kanalo

Jam de la antikvaj tempoj oni pensis fosi kanalon por eviti tiujn malfacilajn ĉarportadojn. Periandro ĝin pro-jektis ; sed tiu restis nur projekto. Cetere Delfo kons-traŭstaris tian projekton ; movigi la teron estis sakrilegio kaj atenco kontraŭ la dia potenco. Plue la scienculoj timis inundojn : la tajdoj en Adriatiko kaj Egea Maro ne tute samtempe okazas ; tial la akvo-nivelejo diferencas kaj la diferenco povas atingi unu metron. Tamen Julio Cezaro rekonsideris la projekton ; sed lia morto male-bligis la efektivegon de la laboro. Caligulo rekomencigis la studojn, kiujn Nerono uzis. En 67 (P.K.) li venigis 5 000 judajn kapitojn el Judeo por tiu giganta entrepreno.

Li mem, ora pioĉo ĉe mano, inaŭguris la fosadon de la kanalo.

Sed la tasko estis superhoma : politikaj eventoj pli urĝaj kaj la morto mem de Nerono interrompis la labo-ron. Oni daŭrigis uzi la diolkoson. Kiam oni fosis la aktualan kanalon oni retrovis la restaĵojn de la eltranĉaĵo malfermita de Nerono ; en kelkaj lokoj ĝi estis profunda je 30 metroj kaj larĝa je 40-50 metroj ; la ruĵoj, disigi-taj de la pluvoj, reprezentis proksimume duonan milionon da kubaj metroj. Eble oni admirus, se oni ne pensus pri la malfeliĉegaj deportitoj, kiuj fosis tiun unuan kana-lon.

Aliaj diolkosoj

Aliaj diolkosoj ekzistis en Eŭropo.

En Jugoslavio, en la arbaro Birnbaum, ligno-vojo kon-dukis la ŝipojn de Adriatiko ĝis la riveregoj de sudorien-ta Eŭropo, ĝis la maro.

Alia identa vojo estis uzata tra la prahistoria Slesvi-go ; ĝi situis proksimume tie, kie pasas la nuna rivero de Kiel ; antaŭ 2 000 jaroj la malgrandaj ŝipoj, kiuj komer-cis en Norda Maro kaj Baltiko, timis la danĝerajn pase-jojn, kiuj troviĝas norde de la Dana duoninsulo ; pere de la rivero Eder kaj de ĝiaj flankriveroj, la ŝipoj eniris en la terojn, tre malproksime ; poste ili vojaĝis laŭ tera vojo. Kaj tio daŭris ĝis plena Mezepoko.

En 1453 la Turkoj sieĝis Konstantinopolon. Ili ĉir-kaŭis la urbon enfermitan en siaj muroj. Kaj, por ataki dorsflanke la kristanan ŝiparon, ili pasigis, de Bosforo ĝis Ora Korno, super la monteto de Pera, ĉiujn siajn ŝipojn. Oni scias kiamaniere Mohamet la dua efektivigis la manovron. Li konstruigis glitejojn, sur kiuj oni tiris sledojn forte ĉarpentitajn por senmovigi la ŝipojn, kiujn ili transportis ; Ĥaŭlis la tuton bubaloj kaj centoj da homoj, kiujn oni antaŭenigis per vipo-klakadoj. Tiu gli-tejo estis pli ol 10 km-longa. Oni pasigis 70 ŝipojn, tu-multe de krioj, alvokoj, ordonoj, en la bruego de la bombkanonoj kaj la koncertoj de tamburinoj kaj fifroj. « Estis, diris venecia ĉeestanto, stranga, nekredbla spektaklo ; kvazaŭ ili estus sur la maro, la ŝipoj navigis tra la kampoj, kun ĉiuj siaj veloj, kun ĉiuj siaj ŝipana-roj, kun ĉiuj siaj armilaroj ».

En la lasta jarcento oni ankoraŭ ne konstruis klu-zojn. Pensilvanio decidis altiri al si la produktojn de Ohio kaj ilin transporti ĝis la maro por ilin eksporti. Sed tiuj varoj devis trairi Aleganojn, kiuj formas barie-ron 800 m-alta laŭ larĝo almenaŭ 200 kilometra. Oni konstruis pecojn de kanaloj ; inter ili ia barĝo estis hisita sur la bordo-deklivon kaj ĝis la supro de la intermonto helpe de vapor-vinĉoj. Poste oni malsuprenigis la bar-ĝon sur la alia flanko ; oni relokis ĝin sur la riveron aŭ la kanalon ; kaj ĝi daŭrigis sian vojaĝon. Tio plurfoje okazis laŭlonge de la irado.

Antikvaj kanaloj

Egiptujo, de la 12-a dinastio fosis kanalon, kiu ligis la oriantan branĉon de Nilo al la Granda Lago Amer.

En 480 ant.K. la persoj Xerxès invadis Grekujon. Por eviti la fluojn, kiuj 10 jarojn antaŭe, detruis la 300 ŝip-ojn de Mardonis, kaj iliajn ŝipanojn, li fosis kanala-lon piede de la monto Athos por pasigi sian ŝiparon.

En 104 ant.K., en Francujo, la romania generalo Marius fosis kanalon inter Rodano kaj Mediteraneo, por ke la ŝipoj evitu la sablo-benkejo de la Rodana estuaro.

S. GUILLOT.

Elena Lucrezia Cornaro (1646-1684)

La unua virino, kiu, antaŭ 302 jaroj, aliris al Doktoreco

Estis la 25-a de junio 1678, en Padovo.

La ceremonio ne okazis, kiel kutime, en unu el la kurso-gambroj de la Universitato, ĉar oni atendis multenombrian publikon. Por akcepti la milojn da ĉeestantoj, oni decidis, ke la ceremonio okazos en la katedralo mem de Padovo.

Elena Lucrezia Cornaro Piscopia estis filino de la riĉega Giovan Battista Cornaro, Prokuroro de Sta Marko en Venecio. Li devenis de tre nobela kaj fama familio, kiu estis doninta kvar dogojn al la Serenisima Venecia Respubliko kaj eĉ unu reĝinon al Cipro.

Tuj de sia adoleska aĝo, Elena Lucrezia montris sian deziron vivi ekster frivolaĵoj kaj mondumaĵoj; ŝi rifuzis edziniĝi. Ŝi volis dediĉi sin al la vivo eterna kaj nedetruibla, ekster ĉia vanteco. Iun tagon, ŝia patro, kiu emis montri sian riĉecon, faris planojn kun artistoj por plibeligigi sian palacon ĉe Granda Kanalo. « Patro, ŝi diris, diondu ĉiun tiun monon al la malriĉuloj. Tiamaniere, vi starigos en Paradizo, palacon pli firman kaj pli brilan ».

Ŝia patro instalas ŝin en sian palacon de Padovo kun servistoj kaj unu kuracisto; ŝi flegis la servistojn, kiam ili estis malsanaj; ŝi uzis sian arĝentaron nur kiam ŝia patro vizitis ŝin. Ŝi povis sekvi la kursojn en la fama Padova Universitato, kreita en 1220 kaj fama pro la rigoreco de siaj studoj.

Tie ĉi ŝi elstudis teologion kaj filozofion (dialektikon). Laŭ siaj biografioj, ŝi parolis diversajn lingvojn (la latinan kaj la grekan, modernan kaj antikvan, la francan, la

hispanan, la hebrean). Ŝi ludis kaj komponis muzikon; ŝi praktikis matematikon kaj astronomion. Dank'al granda inteligenteco kaj eksterordinara memoro.

Tamen neniu mizantropo. Elena Lucrezia volonte akceptis fremdajn scienculojn, partoprenis debatojn, organizis konferencojn. Ŝia fameco rapide disvastiĝis; ŝi estis ano de sep Kulturaj Akademioj; ŝiaj poemoj cirkulis. Oni rakontis anekdotojn pri ŝia sentemo kaj modesteco.

La patro tre deziris, ke lia scianta filino ricevu honorojn. Ŝia preferis diskretan vivon. Tamen pastro konsilis al ŝi respekti la deziron de sia patro.

Giovan Battista Cornaro uzis ĉiujn familiajn gloriojn por venki obstaklojn. Krom unu: tute neeble esperi Doktorecon pri Teologio por Virino! Tamen pri Doktoreco en dialektiko, la Kolegio de la Profesoroj de la Padova Universitato konsentis.

En la 25-a de junio 1678, Elena Lucrezia, 32-jara, tute konfuza kaj tremanta, eniras en la Padovan Katedralon por subteni tezon pri dialektiko.

La demandoj de la ekzaminantoj rapide vigligas ŝin. Baldaŭ, kun aŭtoritateco, ŝi montras sian grandan scion, kiu konvinkis ŝiajn juĝantojn.

Solene, ŝi ricevas la titolon « Magistra et Doctrix ». Oni metas al ŝia fingro la ringon de la doktoreco, sur la kapon la kronon de laŭroj, sur ŝiajn ŝultrojn la ermenan pelerinon.

Sed Elena Lucrezia forgesas tiujn honorojn. Dum ses jaroj ŝi daŭrigas siajn studojn. Malfeliĉe ŝi mortas tre juna, nur 38-jara en 1684.

Laŭ la tri sekvantaj jarcentoj, oni ne forgesis ŝin. Oni ofte citis ŝian nomon. La listo de ŝiaj verkoj pleniĝas tutan paĝon en la Repertuaro publikigita en 1832 pri la virina literaturo.

Sia unua verko datiĝas de 1665, antaŭ ŝiaj 20-jaroj; ĝi estas traduko el hispana libro kaj titolita « Kolokvo inter Nia Savinto la Kristo kaj la pia Animo ».

Libro publikigita en 1896 de angla religiulino, popularigis la nomon de Elena Lucrezia Cornaro transatlantike. En la 19-jarcento, Michele Fanoli portretis sin kun ŝia ermena pelerino, signo de doktoreco.

En 1906, Dunstan Powell ellaboras vitralon, kiu memorigas la doktorecan ceremonion honore al Elena Lucrezia. Tiu ĉi vitralo estas ankoraŭ en la biblioteko de Vassar College, grava virina institucio apud Nov-Jorko, kie la scianta Venecianino estas tre populara.

Unu komitato itala-amerikana formiĝis en Pittsburg por celebri tiun trijarcenton kaj daŭrigi serĉojn en Padovo.

Aliaj virinoj famiĝis antaŭ ol Elena Lucrezia Cornaro naskiĝis; Novella d'Andrea anstataŭis sian malsanan patron inter 1355 kaj 1366; ŝi instruis la Kanonikan Juron en la Universitato de Boloĝna (kreita en 1088). Sed ŝi devis kaŝi sian vizaĝon malantaŭ vualo, signo de modesteco.



FERENC MORA

NENIAM ESTAS UTILE TRO RAPIDI

Jean Bouret estis juna merceristo en vilaĝo Béarn, kie li vendis rubandojn al la virinoj kaj brandon al la viroj. Li adoris la Dion, estimis la reĝon, kio estis iome maloftaĵo tiutempe en Francio. Nome Ludoviko 15-a estis tiam la reĝo, kiun estimi estis malfacile, kaj same ne estis facile adori Dion, kies graco sidigis ĉi tiun fiulon sur la tronon de la reĝo Sankta Ludoviko.

La merceristo estis piulo ekde naskiĝo, ĉiam kontenta pri sia sorto.

— Ĉio estas tiel bona kiel estas — ridetante li trankviligis la foje-foje ekkoleriĝintajn kampulojn —, gravas, ke la edzino estu dika, ĉar tiam ŝi kapablas mamsuĉigi la infanon.

La merceristo estis tiel bona homo, ke li donis rifuĝon eĉ al la impostisto, kiam la kampuloj tian persekutis tra la vilaĝo por dronigi lin en Adour.

— Dio protektu la reĝon! — malfermis la pordon Jean Bouret, kies humila koro ankaŭ en la impostokolektanto estimis la povon devenintan al la dia graco. Kaj li kun la edzino tiel pretigis sian propran liton al la mortlaca homo, kvazaŭ la reĝo mem estus trafinta lian domon kaj li verŝis al li duone malpli da akvo en la glason da lakto ol en la sian.

La impostisto estis dankema kaj la sekvan tagon nokte ĉe la forlaso de la vilaĝo por iri al Toulouse kaj peti helpon de la dragonoj, li transdonis leteron al la merceristo.

— Bona homo, iru kun ĉi tiu letero al Lyon, kiam vi havos tempon kaj portu ĝin al la surskribita adreso. Serĉu mian onklon, kiu estas silkteksisto kaj pro via humaneco li plenigos vian sakon je silkpecoj, per kiuj vi povos fari bonajn negocojn. Kaj mi promesas al vi nur tiam reveni kun la dragonoj, kiam vi jam forvendis vian varon. Ĉar se mi venus pli frue, antaŭ ol vi vendus vian varon, nu ĉiam ĉio stagnus en stoko.

La merceristo jam ĉe tagiĝo prepariĝis por veturi al Lyon, vane jetis sin lia edzino al lia kolo petante lin atendi almenaŭ unu semajnon, ĉar ŝi havas la senton, ke tiam li povos ekvoji jam kiel patro.

— Ne tiel okazos — ridis feliĉe Jean Bouret — oni tiam devas kapti la okazon, kiam ĝi prezentigas. Mi revenos al la batpofesto, sed tiam mi portos tian vindon el silko al via filo, en kía la Sankta Virgulino de Bayonne tenas la sian.

Li kisis sian edzinon laŭ kutimo de Béarn, krucosignis al ŝi la frunton, ambau okulojn kaj la ventron, poste surmuligis kaj metis sin sur la longan vojon. La Madono de Bayonne lin gardis kontraŭ ĉiu malagrablaĵo kaj la dekan tagon li bonŝance alvenis en Lyon, sed, ĉar jam vesperiĝis, li ne ekiris serĉi la silkteksiston en la

nekonata urbo, sed tranoktis en urboranda gastejo, kie malmulte kostis la manĝaĵo kaj la loĝado. Li manĝis la kaĉsupon, trinkis la cidron, poste reiris en sian ĉambron por bone ripozi. Apenaŭ li ekvestis sin, aŭdas malfermiĝi kaj fermiĝi la pordon de la najbara ĉambro, poste interparolado filtriĝis tra la maldika muro. Jean Bouret kiel ĝenerale la merceristoj, estis scivolulo, ankaŭ la nomo de la reĝo frapis lian atenton, tial li gluis sian orelon al la maldika muro.

— Ĉu Damiens surprenis? — li aŭdis la demandan voĉon.

— Tiel destinis la sorto — respondis alia voĉo. — Aŭ li mortigos aŭ li estos mortigita. Francio devas esti savita.

La koro de la merceristo batis en la gorĝo. Li volis agi, sed eĉ pli li gluis sian orelon al la muro.

— Ĉu per ponardo?

— Ĝi estas la plej sekura.

— Kie?

— Tie, kie li trovos tiun. Plej facile estos lin trovi ĉe la putino.

Jean Bouret aŭdis longan oscedon, ŝovadon de seĝoj, klakon de lito, poste ekestis silento.

Li ŝanceliĝe iris en la neĝan korton kaj ekmeditis. Certas, ke ili volas murdi la reĝon. Kion fari? Se li faras bruon, li implikiĝas en malagrablaĵojn kaj ne savos la reĝan moŝton. Se li saĝe agos, la reĝo saviĝos kaj li fariĝos fama homo.

En la drinkejo li vidis lumon, flankenvokis la gastejmastron. Kiuj tranoktas en la najbara ĉambro? La gastejmaŝtro ŝultrolevis; de kie li sciis? Ili povas esti bonhavaĵoj homoj, ĉar estis tre krudaj, kiam alvenis. Sed kial vi demandas sinjoro?

La merceristo volis esti tre ruza. Li diris, ke laŭ la parolado ili estas la spioj de la hispana reĝo estus konsilinde teni liajn okulojn sur ili. La gastejmaŝtro maleme gratis sian nukon. Kial enmiksi sin en la aferon de la reĝoj? Por li neniam profito el tio fruktos, ĉar tiuj ne ĉe li kutimas tranokti.

— Tamen ĝismatene gardu ilian pordon — insiste petis lin Jean Bouret — almenaŭ ĝis mi serĉos la poliestron.

Matene retroviĝis la poliestro, sed tiam oni povis kapti nur la spurojn de la du hispanaj spioj. La gastejmaŝtro ege miris, kiam la poliestro pririspondigis lin pri la eskapintaj gastoj. Kiom koncernas lin ilia foriro? Ili pripagis la fakturon kaj foriĝis. Neniu diris, ke li devas ilin kapti. Li ne scias, pri kio parolas ĉi tiu sinjoro, tiu atentigis lin pri nenio, verŝajne li songis la tutan historion pro la cidro.

— Nu, tio eblas — ridis la poliestro kaj al la merceristo ŝajnis plej racie sin senkulpigi kaj pardonpeti. Li ĝojis, ke li ne implikiĝis en mala-grablaĵojn, kaj decidis veturi al Parizo kaj raportti al la reĝo mem. Surmule li ne volis fari la vojiron, do li vendis la mulon kaj aĉetis bileton diligencan.

— Ja, reen mi veturos en mia propra kvarĉevala kaleŝo, se la reĝo lasos min reveni kaj ne venigos en la kortegon sinjorinon Bouret — li plektis planon en si mem pri la estonteco.

Sed li forĝis planon sen la reĝo. Li alvenis en Parizon ĝuste je Kristnasko, do tuj li iĝis klarvida pri tio, ke tiun tagon neniu lin akceptas. Sekvatage li eksciis, ke tiaspeca ulo kiel li, eĉ labortage ne povas iri al la reĝo.

— Kaj se mi volas sciigi lin pri ia tre, tre grava afero? — li demandis la svisan gvardianon, kiu havis ankoraŭ postfestan ebrieton.

La sviso ekridis kaj ekzumkantis la plej novan kanzonon kies aŭtoron ĝuste tiam serĉigis Madame du Berry fare de la sekreta polico.

Diane, Bacchus et Cythere
De ta vie abrègent le cours...

— Temas pri la vivo de la reĝo — ruĝiĝis honteme la homo de Béarn.

— Ho, alia afero, mia amiko — ekfajfis la soldulo — tio koncernas sinjoron Berryer, jen ĉi tiu vojo kondukas ĝuste al li.

Sinjoro Berryer estis la polica ministro, kiun la reĝo alte estimis ankaŭ kiel verkiston. Ĝuste ĉiutage li redaktis tiujn freŝajn amorklaĵojn kaj am-aventurojn, kiuj la polico kolektis ĝis tagiĝo pri la aristokratoj kaj damoj. La raporto estis ĉiam servita al la reĝa moŝto kune kun la matenmanĝo: okazis, ke li ne tuŝis la manĝaĵon, sed la raporton ĉiam plezure legis.

— Kion vi volas? — li alkriis lin kolere.

— Sinjoro, oni volas mortigi la reĝon — balbutis la merceristo.

— Kiu? — ridetis moke sinjoro Berryer, kiu ne estis timulo, kaj cetere li jam kutimiĝis al la terurigaĵ famoj.

Pro la rideto la bona Bouret perdis la kapon. Subite li ekŝvitis, frotis al si la frunton. Vane li klopodis, li ne kapablis elbuŝigi la nomon de la murdisto.

— Dad... Did... mi ne scias nun, kvankam mi havas lian nomon surlange... Li murdos lin per ponardo; Mi ĵuras je la Sankta Virgulino de Bayonne! En la gastejo de Lyon ili diris. La hispanaj spionoĵ... Jes, mi scias jam... Domi... tamen ne... tuj...

La koro de la polica ministro tuŝiĝis je la balbutanta homo, amike sendis lin hejmen, ke li skribu ĉion, kion li volis diri, eble tie lia memor-

kapablo pli bone funkcios. Sinjoro Bouret obeis, ekiris en la hotelon, dumvoje venis al li en la kapon la nomo de Damiens, tuj li komencis skribi la leteron, ĝin skribis ĝismatene. Grava tasko estis liaflanke tion plenumi! Nome, li kutimis en sia domo nur krete skribi kaj nur sur la pordon kaj nur signojn, kiujn la Franca Akademio certe prenus por druida skribaĵo. Li laŭtleĝos ĝin al la ministro.

Sed oni ne lasis lin eniri, la skribaĵon la skribisto forprenis de li kaj portis ĝin al la ministro, kiu ordonis diri al Bouret, ke li zorgu pri propraj aferoj kaj ne miksu sin en fremdan aferon. Li ĝoju, ke li ankoraŭ bonfartas. Vane li revenis post duona horo, postulante, ke li estu tuj kondukata al la ministro, ĉar li havas tre gravan direndaĵon. En la hotelo « Tri arkistoj », kie li loĝas, nun enhoteliĝis pastrosimila homo kaj li aŭdis, ke oni alparolis lin sinjoro Damiens.

Pro tio oni nur priridis, sed ankaŭ eljetis lin, dirante, ke se li ankoraŭfoje revenos, oni lasos lin eniri, sed neniam eliri.

Jean Bouret subite elreviĝis, ekkoleris kaj hontis. Kiom koncernas lin la aliaj aferoj, sinjoro Berryer gardu la reĝon kiel li volas, li reiros al Béarn por ĉeesti la baptifeston, kaj nome piedire, ĉar li havas nek mulon nek monon, eĉ la manĝaĵon li devos dumvoje almoŝpeti.

Li ne faris unutage kaj duonan vojon, kiam Robert Francois Damiens, la seruristo, en Versailles pikis per ponardo la francan reĝon elpaŝantan el la kastelo Trianon.

— Jen la granda malbono — paliĝis sinjoro Barryer, kiam oni tion sciigis al li. Ne pri la reĝa moŝto li pensis, sed pri la merceristo de Béarn. Ja, se li disbabilos kaj lasos la sekreton eskapi el la buŝo fanfaronante al iuj kaj ĉiuj, ke li antaŭdiris tion, nu tiukaze li ne redaktos plu pikantajn raportojn al la plej kristana reĝa moŝto, sed li iros en Bastille por dresi arancojn.

Unue li jetis la skriban raportos de la merceristo en fajron, due li sendis « ekkapitistojn » /sekretajn policianojn/ sur la spuroj de la ruĝmina Béarnano, ordonante, ke sen li ili ne aŭdacu reveni.

La trian tagon estis arestita Jean Bouret, la diotima, reĝoestima franca ŝtatano. Oni lin rekondukis en katenoj al Parizo kaj sen priaŭskulto enkarcerigis lin en Bastille, en unu el la ĉeloj de grandaj krimuloj; tie li estis forgesita dum tridek du jaroj. La granda revolucio liberigis lin en 1789 kiel inertan, blindan, surdan kadukulon.

Malesherbes, kiu notis ĉi tiun historion en sia memuaro, diras, ke Jean Bouret estis la sola homo en la mondo, kiu priploris la detruigon de Bastille kaj petege demandis iujn kaj ĉiujn, kie li loĝu de nun?

trad. D-ro I. Nagy.

NAPOLEON EN URBO GYÖR

Ĉe la hungara Eldonejo Akadémia aperos la verko de Kornél Bárdos/Bardoŝ/: La muziko de Győr en la 17-18 jarcentoj. El ĉi tiu libro estas elektita la sekva parto. /Pro tio temas precipe pri la muzikaj eventoj./

La 24-a de Junio 1809. « La ekscito de la atenda ekposedis nun la tutan loĝantaron de la urbo. Kiu povis tiu ekiris direkte al la pordego Fehérvári aŭ almenaŭ al ĝia ĉirkaŭaĵo por esti atestanto de la eniro de la francoj... Ĉirkaŭ la kvara horo kaj duono ariĝis sur la placo tuj antaŭ la pordego la eminentuloj venintaj por la oficiala akcepto... Nun de malproksime la intertempe leviginta vento alportas kelkajn melodiojn kaj el la fajroturo ni vidas, ke de tempo al tempo rajdantoj ekaperas en la polvonubo: unue nur kelkaj, poste ĉiam pli kaj pli. Ĉirkaŭe je tricent paŝoj antaŭ la ĉefarmeo rajdas tri oficiroj kun dekdu klarinistoj. Alveninte en la proksimo de la pordego Fehérvári, ili ekblovas siajn klarinetojn; ĉe ĉi tiu signo la pordego de la fortikaĵo malfermiĝas. La franca milita orkestro ekludas rapidritman marŝon kaj dum la tamburbro kaj la trumpetson komenciĝas la eniro. Fronte de la armeo sur nigra ĉevalo rajdas generalo Lauristin ĉirkaŭita de la stabo. Malantaŭ ili la vento flagrigas en la mano de 30-40 standardportantoj la francan « tricoloron », la aliajn militajn standardojn kaj la francajn militinsignojn imitantajn la romian aglon... ».

La 25-a de Junio 1809. « Je la deknua horo eksonas la sonorilego de la karmelanoj kaj preskaŭ sammomente aŭdiĝas la honorisigno anoncanta la alvenon de la vicreĝo Eŭĝeno, la duonfilo de Napoleono. La tuta franca ĉefstabo kaj la alviciĝintaj soldatoj rigide salutis, kiam tra la fortikaĵopordego la vicreĝo enrajdis ĉe la sonoj de la franca nacia kanto kaj kanontondro... Li rajdis al la Bezerédy-domo, kie estis preparita por li loĝejo... Hieraŭ dimanĉ-vespere la orkestro de la okupanta armeo ludis honore al la vicreĝo turkan muzikan serenadon, kiu ne tro plaĉis al niaj oreloj kutimiĝintaj al alia muziko. Poste estis ankaŭ teatra spektaklo, al kiu per muraĵo la gubernatoro Narbonne invitis la burĝojn, sed precipe la virinojn. Nome la pli grandajn francajn taĉmentojn kutimas akompani konstanta kortutro kaj tiel trafis en Győr francaj aktoroj. Subleŭtenanto Montrey menciis hodiaŭ matene, ke de nun ĉiutage krom la subĉiela muziko, estos ĉiun duan tagon teatra spektaklo kaj de tempo al tempo alia amuziĝo, al kiuj ankaŭ la burĝoj estas invitataj... ».

La 10-a de Julio 1809. La festaj eventoj de la venko ĉe Wagram laŭ la taglibro de la preposto Mihaelo Painter : « La gubernatoro volis fariĝi sanktan meson postagmeze je la tria horo en la katedralo; ĉar lia deziro estis neplenumbla, li retiris sian peton. Tial la episkopo kantis nur la himnon Ambrasius en la ĉesto de la oficiraro, kiukaze la preĝejo eĥis pro la akra sonado de la militista orkestro. Ankaŭ la anoj de la urba kaj departementa magistratoj partoprenis la oficialan feston. Je la fino en la horejo la orkestro de la francoj ludis ankaŭ la francan himnon ».

La 14-an de Aŭgusto — legiĝas en la taglibro de la karmelanoj —, okaze de la morgaŭa naskiĝtago de Napoleono, « la gubernatoro vespere je la sesa horo donis por kvardek personoj abundan vespermanĝon. La urbo estis iluminata, la muziko ĉie aŭdiĝis ». Ni citas la tradukon de Bay pri la festo la 15-an de Aŭgusto : « Granda tago salutis la okupantajn francojn. Ĉi-tage naskiĝis la imperiestro Napoleono kaj ili festis la tagon per brila solenaĵo. Jam frumatene en la urbo marŝis orkestroj kies sono miksiĝis kun tiu de la kanontondroj anoncanta la gloron de la imperiestro. Sur la vendoplaco oni aranĝis teatrajn spektaklojn kaj prezentis diversajn militajn ludojn; oni riĉe gastigis la soldatojn. Postagmeze post « Te Deum », la gubernatoro Narbonne aranĝis grandan festenon, al kiu estis invitataj la ekleziaj moŝtuloj kaj la anoj de la superaj klasoj, same la ĉefoficiistoj; la gastigado okazis parte en la palaco de la gubernatoro, parte en la Bezerédy-domo, en la episkopa palaco kaj en la ĉambrego de la danclernejo. Ĉi-okaze la soldatoj donis senpagan tagmanĝon al la malriĉuloj. Vespere post la blinde brila artfajraĵo, kolonelo de La Salle aranĝis kune kun la burĝaro dancamuziĝon ĝismatene; je cetero admindinde iluminigis la tutan urbon. La soldatoj havis freneze gajan humoron. Dum la tuta nokto aŭdiĝis kanonbruido, taktakado de pafiloj, muziko, senbrida ĝojkriado ».

Bedaŭrinde neniu fonto parolas pri la rolo de la muziko okaze de la vizito de Napoleono la 31-an de Aŭgusto, ĉe ne Bay, kiun ni citas : « Postagmeze je la dua horo tra pordego Vieno enbruis la imperiestra kaleŝo ĉirkaŭita de rajdantaj korpardistoj kaj antaŭ la monaĥejo de la karmelanoj haltis la ŝaŭmantaĵo ĉevaloj de la jungaĵo. La sonorilegoj de la preĝejoj disflugigis la famon : nia granda gasto alvenis... Vespere en la loĝejo de Napoleono, en la Bezerédy-domo, Narbonne donis vespermanĝon honore al Napoleono. Inter la multaj brilaj vespersolenaĵoj, kiujn grafo Narbonne aranĝis dum sia restado en Győr kiel gubernatoro, eble tiu de la 16-a de Oktobro estis la plej granda ».

La karmelanoj jene memoras pri la festo okaze de la packontrakto : « Laŭ la invito de la gubernatoro, antaŭtagmeze je la deka horo la burĝoj de Győr gvidataj de la magistrato iris en la katedralon. La tuta soldataro en festa ordo, ĉe la turkeca muziko kaj tamburbro de la grenadistoj defilis kaj iris ĝis la mezo de la preĝejo. Kanoniko Emeriko Nagy faris meson, poste sekvis « Te Deum »... Poste ili sammaniere eliris kaj defilis ».

La 17-an de Novembro 1809 la francoj forlasis la urbon tra la pordego Vieno en militista parado...

Tradukis : Dr-o István NAGY.

Rim. : Győr /Djör/ ; ö kiel la franca eu/ estas apud la Danubo meze inter Budapeŝto kaj Vieno. Te Deum /Vin Dion/ estas katolika kanto.

POR VIA DISTRO

Solve de la antaŭa problemo

Krucvorto

K	O	N	F	E	R	E	N	C	O
A	R	O		K	O	R	E		V
R	I	M	A	R	K	I	N	D	A
I		I	T	A		K	I	E	L
O	K		E	N	E		O	R	O
F	A	R	S	O		R		M	
I	M	I	T		P	A	R	O	J
L	E	P	O	R	I	N	O		U
O	R	A		E	R	O	T	I	K
J	O	R	O		O		O	N	I

Per Esperanto eblas ĉion esprimi

Petro renkontiĝas kun sia amiko Paŭlo, kiu estas kun du aliaj personoj.

Pe : Saluton Paŭlon !

Pa : Bontagas ! Permesu al mi, ke mi, prezentantu al vi Stefanon.

Pe : Ĉu ankaŭ li estas esperantisto ?

Pa : Ne. Jam ne. Li estas esperintisto. Li lernis Esperante, sed tute forgesis ĝin.

Pe : Jes. Mi komprenas.

Pa : Jen Julio, kiu estas esperontisto.

Pe : Mi ne komprenas.

Pa : Li baldaŭ komencontas, ne ...komentas lerni nian lingvon ; do mi ne povas diri ankoraŭ pri li, ke esperantisto.

Pe : Kaj kiu ŝatus esti esperantisto, ĉu tiu estas esperuntisto ?

Pa : Jen ! Pri tio mi ankoraŭ ne pensantis. Dankaŭ ! Mi tuj serĉos iun. Mi jam sciانتas ! Gabrielo kaj Gabriela. Tiuj ĉiam diris, ke geli ŝatus lerni Esperanton, do geli estas geesperuntistoj. Ĝis ! /Ili foriras./

Pe : Quo vadis Esperanto ? /Kien vi iras Esperanto ?/

/Post kelkaj minutoj./ Sed kio estas geli ? Ah, mi jam scias ! Li kaj ŝi estas geli. Sed kial ne geliĝ ? Li kaj ŝi estas du personoj, do pluralo... Sankta ĉielo ! Ĉu jam ankaŭ mi ? !
/Li enpeniĝe pluiras malrapide./

I. Nagy.

RAKONTETOJ

Maljunulino devas subskribi ĉekon, sed ŝi ne scias, kiel fari tion.

— Tiel subskribu ĝin, kiel vi kutimas subskribi la leteron — diras al ŝi la bankoficisto.

La maljunulino kapjesas kaj skribas :
« Multfoje mi kisas vin ĉiujn, via onjo Agata ».

Irlandano promenas surborde de rivero, kiam ekvidas, ke iu ĵetas sin en la riveron, sed tiu ne scias naĝi. La irlandano senhezite saltas en la akvon, lin savas kaj iras plu. La memortigemo denove ĵetas sin en la riveron, sed la irlandano ree lin eliras, sed nun li restas tie, sidiĝas. Baldaŭ la viro stariĝas, iras al la arbo kaj sin pendumas.

Venas la kuracisto por konstati la morton kaj lin demandas :

— Vi savis dufoje ĉi tiun homon, kial vi ne savis lin ankaŭ la trian fojon, tranĉante la ŝnuregon ?

— Kial ? Nu. mi ne pensis, ke li volas sin mortigi ; mi opiniis, ke li pendigis sin por sekiĝi.

Jean — diras la grafo al sia servisto — kion oni prezentos ĉi-vespere en la teatro ?

— Henriko la 8-a.

— Bedaŭrinde mi ne povus ĝin ĝui, ĉar mi ne vidis la antaŭajn sep.

Kanibalido venas hejmen ĉirkaŭ vespero kaj ekvidante ĉerkon apud la kabano, ekploras.

— Kial vi ploras ? — demandas lia patrino.

— Ĉar hodiaŭ la vespermanĝo estos de nove konservajo.

I. Nagy.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



RE

PREFIKSO MONTRANTA :

- **denovan venon al antaŭa loko aŭ stato :**
reiri al ; reveni de ; redoni monon ; re-
bonigi vestojn ;
- **ripeton de ago :**

relegi, rekoni, remaĉi, ĝis revido.


REA — REE :

pri tio mi petis ree kaj ree ; la pendolo
iradis tien kaj reen ; ira kaj reira bileto.

NI RIMARKU

re-eniri (denove eniri) reen-iri (returne iri)

Pasko-postulo :



Kiom stultaj estas niaj mastroj ! La tutan
jaron ili perkrie kaj perjurnale plendas kontraŭ
la nerespekto de la Ekologio, kaj konstatu : dum
la tuta monato, ili metis kaj remetis kolorigilojn
nenaturajn, en nian nutraĵon. Despli malbone
por ni kaj por niaj ovoj !

Etnaturulo !



— Nu, diru : ĉu pri la aŭto-ekzameno, ĉio
bone okazis ?

— Kредu min ! kiom da emocioj ! Mi tre
atentis miajn manovrojn : mi ŝaltis, mi traku-
ĉis la rapidumojn, mi akcelis, mi bremsis...

Verdire la ekzamenanto ankoraŭ nenion
diris... li ankoraŭ ne rekonsciigis !

Plibone malfrue ol neniam :



Mi rediras al vi : viskio kaj televido estas
vintraj okupadoj. Nun revenis la printempo :
estas la bona tempo por finfine elpaki viajn
kristnaskajn donacojn.

**NOUS TENONS EGALEMENT
A VOTRE DISPOSITION :**

Cartes postales de Grésillon, noir :	0,80
couleur :	1,00
Cuillères de collection	: 25,00
Pendentifs	: 20,00
Porte-clés	: 20,00
Coupe-papier	: 35,00
Thermomètres voitures	: 35,00
Etoiles pour vitres de voitures	: 4,00

Pensez à acheter :

**FALSAJ AMIKOJ
en Esperanto**

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie,
théâtre, histoire, géographie,
sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET

« La Timeraie »

VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 50 Fr.

**POUR VOS COURS
DE PERFECTIONNEMENT**

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin**

Prix : 20,00 Fr. + Frais d'envoi

**NOS COURS
PAR CORRESPONDANCE**

Cours 1^{er} degré. — 16 livrets
illustrés qui permettent d'acquérir
les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2^e degré. — 14 leçons
présentées sous forme de feuillets.
Permet d'acquérir une connaissance
pratique de la langue. Cours et
corrections : 60,00 F.

Cours 3^e degré. — Excellent
entraînement à un cours supérieur :
versions, thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 40,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de
cours à ceux qui ne les possèdent
pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE

CATALOGUE

...aujourd'hui

Kredu Min Sinjorino

de Cezaro ROSSETTI

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...



Le Conseil d'administration a, dans sa réunion du 19 octobre, fait un certain nombre de constats et pris un certain nombre de décisions. Vous pouvez lire le compte rendu de cette réunion dans ce numéro de la revue. Mais il est bon, je crois, d'apporter quelques commentaires.

Sur le plan culturel, l'année 1980 a été un succès. Les propos des stagiaires et des animateurs semblent le prouver. Le succès absolu n'existe pas, mais puisque les stagiaires ont, pour la plupart, trouvé ce qu'ils cherchaient, consciemment ou non, puisque ceux qui ont fait des conférences, guidé des cours ou des activités se déclarent satisfaits, puisque l'espéranto a joué son rôle, je ne pense pas qu'il s'agisse, de la part des responsables, d'auto-satisfaction. D'autant plus que nous savons fort bien qu'il y a beaucoup de choses à améliorer, à modifier ; il faut aussi innover pour ne pas verser dans un ronronnement satisfait.

Sur le plan financier, l'année n'a pas été mauvaise. L'augmentation plus forte que prévue des prix a effacé en grande partie le surplus de recettes apporté par un plus grand nombre de participants. Mais si les excédents de recettes ne sont pas assez importants pour nous permettre de réaliser tout ce que nous projetons, chaque année voit cependant des améliorations qui rendent plus agréable le cadre dans lequel nos amis sont appelés à vivre quelques jours ou quelques semaines. Dans ce domaine aussi, il y a beaucoup à faire car la gestion de la Maison Culturelle, dont les stagiaires n'ont qu'un faible aperçu en été, n'est pas une mince affaire. Elle requiert beaucoup de dévouement, ce que l'on peut trouver, et aussi beaucoup de compétences diverses, ce qui parfois fait défaut. Il faudrait pour que cette gestion soit assurée avec une réelle efficacité que les tâches soient plus partagées, que de nouvelles bonnes volontés apparaissent pour assurer de temps à autre la responsabilité administrative d'un stage et aussi pour accomplir pendant l'année une tâche bien définie. Aucun élément de la gestion n'est en soit difficile ; la mise au courant est rapide. C'est l'entassement des charges qui peut dépasser les forces des responsables et leur donner le sentiment qu'il ne leur reste plus de temps pour faire autre chose que ce qui a jusqu'alors réussi. C'est pourquoi chaque membre du Conseil d'administration, chaque conseiller technique présent a reçu un relevé des différentes tâches de gestion. Certaines de ces tâches sont complémentaires les unes des autres. D'autres peuvent sans doute être accomplies séparément. Il faut arriver à une division du travail qui permette aux responsables actuels de libérer un peu leurs épaules, à chacun de prendre une part plus grande à la vie de la M.C.E., à la Maison d'éviter que la trop grande concentration des tâches rende difficile, le jour venu, un changement de responsables, et que cette concentration frappe d'immobilisme une œuvre qui a fait une longue route pavée de succès, mais qui pourrait un jour s'essouffler.

P. BABIN.

INTER NI

Laŭ kultura vidpunkto la jaro 1980 estis sukcesa. Ĉeestintoj kaj gvidintoj samopinias pri tio. Sajnas ke la partoprenantoj trovis, kion ili, konscie aŭ nekonscie, esperis trovi, ke la gvidantoj almenaŭ grandparte ŝatis sian laboron en favora etoso, ke esperanto ludis sian rolon; ne temas pri memkontentigo. Despli ĉar ni bone scias, ke multo restas por fari, por plibonigi, por modifi; ankaŭ necese estas novigi por eviti kontentoplenan ronronadon.

Laŭ financa vidpunkto la jaro ne estis malbona, kvankam la altigo de la varoprezoj, pli forta ol antaŭvidite, elprenas grandan parton el la plia mono alportita de pli granda nombro da ĉeestantoj (kompare kun 1979). Se la diferenco inter en-/ kaj elspezoj ne estas sufiĉe granda por ke ni realigu ĉiujn niajn projektojn, ĉiujare plibeligas la kadro en kiu niaj amikoj vivas kelkajn tagojn aŭ kelkajn semajnojn.

La estrado de la Esperanto-Domo ne estas simpla afero. La someraj taskoj estas nur parto de la tuto. Estas necese, ke la diversaj taskoj estu dispartigitaj inter pli da bonvolentuloj por atingi veran efikon. Estas dezirinde, ke novaj amikoj akceptu, de tempo al tempo, la respondecon de unu el la someraj periodoj aŭ konsentu plenumi tutjaran taskon ne tro temporaban. Nur la tromulto da laboro sur unu paro de ŝultroj elĉerpas la fortojn de individuoj, kiuj havas la senton, ke ili povas fari nur tion, kio ĝis nun sukcesis.

Ciu membro de la konsilio estis invitita pripen-si pri listo de la plenumataj estrad-taskoj kaj eventuale (espereble!) akcepti parton de la laboro, por ke la neevitebla iama ŝango de respondeculoj ne fariĝu malfacila pro tro granda koncentrado de tiuj taskoj, kaj ankaŭ por eviti, ke al asocio kiu iris longan sukcespavimitan vojon iam manku la spiro.

NOS PEINES

Magda Chirer, bien connue des habitués de Grésillon, est morte. Tous ceux qui l'ont connue évoqueront sa gentillesse et son désir constant de contacts humains.

Hélène Lavallée qui fut une très active espérantiste, et une grande amie de notre maison est décédée en novembre. Nous présentons toute notre sympathie à sa famille.

EKZAMENSESIOJ EN GRESILLON (1980)

Sukcesis en la ekzamenoj de F.E.I.

Atesto pri lernado :

Binche Janine, Burnay Robert, Clément Franck, Fleury Normand, Goursaud Nicolas, Lepage Yves, Moulin Monique.

Atesto pri praktika lernado :

Czillou Bernard, Cavalie Calixte, Feneyrol Monique, Feneyrol Olivier, Vanwalleghem Annie.

Sukcesis en la Internaciaj ekzamenoj.

Internacia ekzameno pri elementa lingvoscio :

Becher Brigitte, Boucher J.-Luc, Desforges Patrick, Fleury Normand, Ghassabzadeh Mohammad, Gradusov Shirlev, Haghiha Mansure, Hlauschek Elisabeth, de l'Hommeau Huguette, Llorca Vincent, Pinter Josseline, Rezaifar Marzam, Terramoto Manuel, Tordera Jozefo, Trnka Gerhard.

Internacia ekzameno pri praktika lingvoscio :

Gradusov Shirley.

Réunion du Conseil d'Administration 19 Octobre 1980

Le Conseil d'administration s'est réuni à Grésillon le 29 octobre 1980, à 10 heures.

Étaient présents : Mmes Prévot et Vincent, MM. P. Babin, D. Babin, Bénistant, Boyet, Ciret, Dairon, Guillot, Mathé et Métivier.

S'étaient excusés : Mmes Cheverry et Micard, MM. Bodereau, Chevalier et Le Magadure.

SEJOURS 1980

Premier séjour. — Le nombre moyen de personnes présentes par jour a été de 72, avec un nombre maximum de 90. Le nombre d'étrangers a été un peu supérieur à celui des Français. Le nombre de conférences a été important, les sujets divers et de haut niveau. Les cours ont été bien suivis. Le séminaire de Sino Childs-Mee annoncé un peu tard a eu du mal à s'insérer

dans le programme et n'a pas rencontré le succès mérité.

Deuxième séjour. — Le nombre moyen de stagiaires a été de 82, avec une pointe de 96. Les cours ont très bien fonctionné. Le nombre de jeunes enfants était important, et Sino Childs-Mee a organisé un cours spécial à leur intention. Beaucoup de participants regrettent qu'il n'y ait pas eu de cours le dimanche, car si l'on retire également les jours d'excursion la durée du stage d'étude est très diminuée. Les deux examens internationaux ont eu du succès. Mais il faudra qu'une commission en fixe le niveau et le règlement de manière plus précise.

Troisième séjour. — Le nombre moyen de participants a été de 55, avec un maximum de 72 personnes présentes en même temps. L'activité principale, la photographie, n'a pas réuni

plus d'une dizaine de personnes. Les cours ont eu du succès, mais ont été gênés par un départ important de stagiaires au cours de la dernière semaine.

Les disponibilités au 30 septembre 1980 étaient les suivantes : caisse, 2.557 F. ; C.C.P., 46.921 F. ; banques : B.N.P., 650 F. ; Banque Populaire, 6.000 F. ; Caisse d'Épargne, 51.100 F. Un aperçu des dépenses et recettes permet les comparaisons suivantes avec 1979 :

Recettes : séjours, + 20 % ; boissons, + 15 % ; librairie, + 30 % ; souvenirs, + 30 %.

Dépenses : alimentation, + 28 % ; salaires, + 24 %.

L'augmentation du secteur alimentation s'explique à la fois par le nombre plus grand de participants et par l'augmentation importante des prix.

SEJOURS 1981

Printemps : du 29 mars au 5 avril. — Rencontre internationale d'enfants, avec diversification des activités. En même temps aura lieu un stage de pédagogie théorique et pratique. Cette semaine sera animée par les responsables habituels : F. Boyet, F. Le Magadure, J. Vincent.

Été : première période, du 2 au 22 juillet. — Conférences et cours. Administration, M. et Mme Babin.

Deuxième période, du 23 juillet au 12 août. — Cours de différents niveaux ; travaux manuels. Intendance, Pascale Babin.

Troisième période, du 13 août au 2 septembre. — Etude et pratique de la langue. Séminaire : « L'enseignement de l'espéranto par la méthode directe ». Activités artistiques et manuelles (en particulier la photographie). Administration, M. et Mme Mathé.

Le programme des activités de 1981 sera publié dans les délais les plus brefs. Paraîtront ensuite des programmes plus détaillés pour chaque période.

Tarifs : il est décidé d'augmenter les prix de séjours de 12 à 13 %. Le droit d'inscription passe à 30 francs par semaine et à 75 francs pour un stage complet de 3 semaines.

Le prix des cours par correspondance sera de 80 francs pour le premier et le deuxième et 50 francs pour le troisième.

TRAVAUX

La remise à neuf du couloir du deuxième étage doit avoir lieu cet automne. Une petite chambre à un lit sera prise sur la grande chambre 29. Le plafond de la chambre 1 sera refait, ainsi que l'installation électrique. Il est envisagé de mettre des portes coupe-feux dans les couloirs du premier et du deuxième étages. La peinture et la tapisserie seront faites par des équipes de bénévoles. Le problème du chauffage de la grande salle extérieure est mis à l'étude. ; l'installation devra être faite avant la rencontre de printemps.

Les peupliers qui avaient atteint l'âge de l'exploitation ont été vendus et abattus. La somme reçue permettra d'en replanter une centaine. Il faudra également abattre certains sapins malades dans le bois. L'entretien du sous-bois peut être réalisé par des personnes désirant du bois de chauffage. Cela sera fait sous le contrôle d'un spécialiste qui a accepté de nous apporter son aide.

Plusieurs méthodes ont été proposées pour faire disparaître les herbes de l'étang. Le problème sera étudié.

Il est envisagé de moderniser les cours par correspondance par une présentation sous forme de cassettes. L'expérience débutera avec le cours du 2^e degré.

M. Röllinger avait proposé de réaliser une décoration de la façade du château. Le Conseil d'administration pense que cela n'est pas souhaitable, d'autant moins qu'à l'occasion de l'Année du Patrimoine un envoyé des Beaux-Arts est venu faire des croquis de certaines parties du château et a recommandé de le conserver en l'état.


Enfin, le président remet à chaque membre un relevé de toutes les tâches exigées par la gestion de la Maison. Chacun est invité à examiner ce relevé afin qu'une répartition plus équilibrée de ces tâches puisse être réalisée entre tous les membres.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 16 heures.

Le secrétaire de séance : J. VINCENT.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivis tōntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
- Hispanujo** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).
- Israelo** : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
- Italio** : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (8000 liroj).
- Japanujo** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatîōzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (22 guld.).
- Norvegujo** : S-ino Louise Bøe Maridalsveien 128 A OSLO 4.
- Peruo** : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (12 us. dol.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
- Svedujo** : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).
- Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60304 (12 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.